Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 9-an de aprilo 2015 per Skype.

(Protokolo aprobita la 30-an de aprilo 2015)

Partoprenis:
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Ulf Lunde en Os,
Mario Machlik en Bodø ekde tagord-punkto 3
Amelie Matt en Tromsø
Herman Ranes en Trondheim

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 19-an de marto
Aprobita.

2. Ekonomio
La kasisto raportis pri la ekonomio:
Skagen Vekst kr 51 260,61
Skagen Høyrente kr 126 785,41
NEL transprenis la kason de Bergen Esperantoklubo, 5 976,22 kronojn.
Ni petu, ke ankaŭ la kasisto de la Esperantoklubo en Stavanger sendu ĉiom da mono al NEL kaj ĉesigu la konton. NEL ĉesu sendi la ĉiujaran monsubtenon al la dormantaj kluboj (Bergen, Stavanger), se tiuj koncernitaj kluboj konsentas pri tio.

3. Jarraporto kaj jarkalkulo 2014
Nur iomete da progreso okazis pri la jarraporto de la pasinta fojo. Daŭre mankas la partoj pri mencioj en gazetoj, pri abonantstatistiko, pri ekonomio kaj la konkludo.
La kasisto multe laboris pri la jarkalkulo, sed ŝi ankoraŭ bezonas kelkajn tagojn por finfari ĝin.

4. Ricevita propono por la Landa Kunveno
La estraro ricevis proponon de Mario Machlik pri statutŝanĝo kiu enmetos «støttemedlem» kiel novan membrokategorion. Li jam klarigis sian proponon en Norvega Esperantisto 2/2015. Ni starigos tion kiel punkton en la tagordo de la Landa Kunveno.

5. Tagordo por la Landa Kunveno, horaro kaj detala programo
Ni decidis pri tagordo kaj diskutis la horaron kaj detalan programon.

6. Eventualaĵo
Ni faris etan ĝustigon en la estrara protokolo 20.11.2014.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 21:10
La venonta interkonsiliĝo okazos la 30-an de aprilo 2015.

Raportis Mario Machlik